

La 104a Japania Esperanto-Kongreso en Jokohamo, Kanagavo, la 3a-5a de novembro 2017

Tempo: la 3an (ven.), 4an (sab.), 5an (dim.) de novembro 2017

Loko: Kanagawa Roudou Plaza (Yokohama-shi Naka-ku Kotobuki-cho 1-4) tel.: 045-633-5413

Organizas Japania Esperanto-Instituto, NPO Esperanto Jokohama

Kunlaboras Esperanto-Ligo de Kanagavo

Aŭspicias Ministerio de Edukado kaj Scienco, Japania Nacia Komisiono por UNESKO, La

Japania Internacia Fonduso, Nacia Federacio de UNESKO-Asocioj en Japanio, Instituto

Pola en Tokio, la gubernio Kanagavo, la urbo Jokohamo, Fonduso de manĝo-edukado en

lernejoj en Jokohamo, amaskomunikiloj



Kongresa temo: Haveno peras, Esperanto peras

Prelegoj pri la kongresa temo

① **KIMURA Goro Christoph** (profesoro de Sophia Universitato, lingvisto pri socilingvistiko): “Kion Esperanto povas oferti al la hodiaŭa mondo?” – Ni unue rigardas, inter kiaj malsamecoj Esperanto povus ponti dialoge. Dokumentoj kaj konceptoj el la Esperanto-movado sugestas, ke Esperanto povas kontribui por ponti inter pli da malsamecoj ol nur lingvaj. Sekve ni pripensas, ĉu Esperanto havas ecojn aparte taŭgajn por tia pontado. (en la japana, kun Esperanta traduko)

② **Dieter KLEEMANN** (loĝanta en Germanio, kuracisto) “La 4a de septembro 2015 kaj la sekvo por la politika kaj socia evoluo en Germanio kaj Eŭropo” – Nun estas granda problemo: rifuĝintoj amasiĝas ĉe landlimoj; ĉu akcepti aŭ rifuzi ilin? Ĉu haveno peras? Unu el la ĉefaj obstakloj por integriĝi estas la manko de komuna lingvo. En tiu senco ni esperantistoj el diversaj mondopartoj havas laŭ mi specialan “trezoron” por amike interkompreniĝi. (en Esperanto, kun japanlingva traduko)

Prelego pri cent jaroj post la forpaso de Zamenhof (Kun la helpo de la Instituto Pola en Japanio)

Pasis 100 jaroj post la forpaso de Zamenhof. Memore al tio ni invitas polan esperantiston **Robert KAMIŃSKI**, kiu estas sekretario de Pola Esperanto-Asocio. Li parolos pri “Zamenhof en Varsovio, lia vivo kaj la tempo malfacila por Esperanto”.

Aliaj prelegoj

Ulrich LINS (la aŭtoro de *La danĝera lingvo*) prelegos “La esperantisto Rudolf CARNAP”. Carnap estis germana filozofo. Li eklernis Esperanton, kiam li estis 14-jara. “Li defendis la lingvan forton de Esperanto kaj la utilon kaj plezuron, kiujn donas ĝia praktikado. Esperanto estis por Carnap konsistiga parto de lia fido je paca, demokratia mondo...”

Partoprenos ankaŭ aliaj esperantistoj el diversaj landoj. Ili certe kontribuos por pliriĉigi la enhavon de la kongreso. Okazos ankaŭ prelegoj de japanaj esperantistoj pri diversaj temoj.

Ĉefaj Programeroj

la 3an de nov. (ven.): 13:00~16:30, Malfermo, Prelegoj pri kongresaj temoj, prezentado de fakkunsidoj kaj aliaj programeroj,

17:00~19:00 Arta Vespero (kantado kaj aliaj)

la 4an de nov. (sab.): 09:00~, Prelegoj en Esperanto kaj en la japana, programeroj por komencantoj, programeroj rilate al Japana Esperanto-Instituto, fakaj kunsidoj, oratora konkurso, enkonduka kursaro por urbanoj.

18:00~, Bankedo en restoracio en la ĉina kvartalo

la 5an de nov. (dim.): 09:00~ Prelegoj en Esperanto kaj en la japana, programeroj por komencantoj, programeroj rilate al Japana Esperanto-Instituto, fakaj kunsidoj, Hama-logio

14:00~ Fermo

15:00~ Postkongresaj Ekskursoj

Diversaj Programeroj

● Kulturaj prelegoj Pri Esperanto, japanlingve: ① HAGIWARA Yoko “Kiel Esperanto venis al Japanio?”, ② KAWANISI Teturo “Zamenhof”, ③ TSUDA Masao “Pri legado de Esperantaj libroj”, ④ NAGAMACHI Shigeaki “Vojaĝo per Esperanto tra la mondo”, ⑤ TANAKA Tetuzi “Blinduloj kaj Esperanto”

● Kursoj por profundigi konojn pri Esperanto, japanlingve kaj Esperante: ① OGAWA Hirohito “Esperanto laŭ etimologio”, ② HUZIMAKI Ken’iti “Kiel lerni Esperanton”, ③ TAKUMA Kenzi “Korelativoj”, ④ AIHARA Misako “Provo de skeĉo kun sufloro”

● Prezentado de filmoj: SAGUTI Yuko “Historio de manĝoservo en lernejoj en Jokohamo,

Plena Rondo “*Leaving Language*”

● Arta Vespero (nun planata): unu kantogrupo kaj du kantistinoj kantas plejparte en Esperanto.

● Hamalogio: Prelegetoj pri Jokohamo. TANIGAWA Hiroshi “Pri la kvartalo Kotobuki-cho”, SUZUKI Keiichiro “Biero en Jokohamo”, NAMBA Fumiharu “Akvo en Jokohamo”, SIBAYAMA Zyun’iti “Malnova ĉefvojo ‘Tōkaido’ kaj la fervoja linio de Tōkaido”, DOI Ĉieko “Esperanto-movado en Kanagavo”

● Programeroj por komencantoj: Spertaj veteranoj gvidos ilin konversacii en Esperanto.

● Enkonduka kurso de Esperanto por urbanoj. Gvidos KITAGAWA Syōzi kun helpo de spertuloj

Memoraĵoj

① “Gvidlibro pri Jokohamo”

Ni jam eldonis du versiojn de la gvidlibro de Jokohamo. Do, la nun planata gvidlibro estas la 3a versio. Tamen la enhavo estos tute alia. Nun la ĉefa kompilanto, NAMBA Fumiharu, redaktas kun la helpo de aliaj membroj tute novan version. Ĝi enhavos turismon, historion kaj nuntempaĵojn.

② “Esperanto en Kanagavo – Historio de Esperanto-movado en Kanagavo” en la japana, kompilita de DOI Ĉieko.

La gubernio Kanagavo estis lulilo de Esperanto-movado en Japanio. Fondiĝis Nippon Esperanto-Societo en la urbo Jokusuka en 1906, 15 tagojn pli frue ol fondiĝo de Japana Esperantista Asocio en Tokio. De tiam la gubernio estis iam motoro de la movado, iam preskaŭ dormanta. En ĉi tiu libro vi povos legi ne nur la movadon en Jokohamo, sed ankaŭ en aliaj urboj de la gubernio.

Por Partopreno

(enoj)

	partopreno	limdato→	-07-31	08-01~	○ kun memoraĵoj kaj raporto
①	ĝeneralaj		6 000	7 000	○
②	handikapuloj		3 000		○
③	familianoj		3 000	4 000	se vi ne volas ricevi memoraĵojn, aliĝu je ①
④	junuloj, alilandaj studentoj		3 000		○Junuloj: naskitaj antaŭ 1987-12-31.
⑤	samaj sen memoraĵoj		2 000		Nepre skribu vian naskiĝ-daton/jaron
⑥	mez-kaj supermezlernejoj		1 500		○Se vi partoprenas sola
⑦	bazlernejoj		senpage		
⑧	el eksterlando		2 000		○ lernejoj pagu laŭ ⑥, ⑦
⑨	morala partopreno		3 000		○ Se vi reale partoprenos, pagu restsumon.
⑩	memorfoto		1 000		Ricevu la foton en la lasta tago.
⑪	tagmanĝo I (11-04)		1 000		
⑫	tagmanĝo II (11-05)		1 000		
⑬	Bankedo (11-04)		6 500		En Ĉina Kvartalo (11-04, 18:00~20:00)
⑭	Postkongresa Ekskurso A		25 000		al Enoshima, tranokto, tagmanĝo aparte.
⑮	Postkongresa Ekskurso B-1		23 000		Vespermanĝo en luksa ŝipo dum krozado, tranokto en Jokohamo, promenado en Jokohamo
⑯	Postkongresa Ekskurso B-2		11 000		Vespermanĝo en luksa ŝipo dum krozado
⑰	Ekzameno de JEI		Unua : 5 000/ Dua : 3 000/ Tria : 2 000/ Kvara : 1 000		

◆Por nuligi: Oni ne repagos ①~⑨, ⑰. Pri ⑩~⑯ post la kongreso oni repagos, se vi anoncos la nuligon antaŭ 10-25.

◆Aliĝu per ĝiro “Japana Esperanto-Kongreso A: 00130-4-744162. Se vi ne povas pagi anticipe estante ekster Japanio, informu tion al <jek2017@jei.or.jp>.

◆Pri tranokto, bv. mem aranĝi.

Postkongresaj Ekskursoj (15:15~ post fermo de la kongreso. Bv. nepre anonci antaŭ la fino de septembro)

- ⑭ Postkongresa Ekskurso A: Kongresejo→Enoshima, tranokto en japanstila hotelo, en la 6a de nov. turismo en Enoshima, tagmanĝo, akvario malfermita en 2004→disiĝo
- ⑮ Postkongresa Ekskurso B-1: Kongresejo→vespermanĝo dum veturado en la golfo per la luksa ŝipo *Royal Wing*→tranokto en hotelo ĉe la marbordo; en la 6a de nov. promenado en Jokohamo kun vizito al turismaj lokoj sur la monteto, interalie al a tombo de Alfonse MISTREL, franca esperantisto, unu el pioniroj de Esperanto-movado en Japanio, tagmanĝo→disiĝo
- ⑯ Postkongresa Ekskurso B-1: Kongresejo→vespermanĝo dum veturado en la golfo per la luksa ŝipo *Royal Wing*→disiĝo

Bonvolu anonci vian partoprenon en la postkongresaj ekskursoj laŭeble frue. Se la aliĝintoj estos malmultoj, povas esti, ke ni nuligos la ekskursojn.

- turisma kompanio: Keihin Travel Service
(registrata de la gubernia estro de Kanagavo, n-ro 3-931)



Kongresejo: Kanagawa Roudou Plaza

Yokohama-shi Naka-ku Kotobuki-cho 1-4, tel.: 045-633-5413
 Por iri tien, trajne veturu de la stacidomo de Jokohamo al Isogo
 aŭ Oofuna laŭ la linio de Negishi, kaj elvagoniĝu en la
 stacidomo de Ishikawa-cho, eliru de la norda elirejo de
 stacidomo, piede 3 minutojn. Vidu la mapon kaj la foton!

Pri la kongreso havu kontakton kun Japana Esperanto-Instituto
 (+81-3-3203-4581), rete: <jek2017@jei.or.jp>
 aŭ kun NPO Esperanto Jokohama: info@esperanto.yokohama

